1-a Jaro, N-o 52

APERAS S.A.T. SEMAJNE

24. Septembro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktejo: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando

La daŭra plimalboniĝo de la vivkondiĉoj de nia laboristaro kune kun la forigo de ĉiuj rajtoj deveniintaj el la 1918a revolucio kreis en la laboristaj cerboj la deziron trovi eliron el la politika kaj ekonomia ĥaoso en Germanio. Dum tiu ĉi preskaŭ malespera tempo alvenis de Leningrad letero sendita de la laboristoj de Putilova uzino. Estis invito al la germana laboristaro veni Sovetion kaj studadi la situacion de la tieaj kamaradoj. Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj oni ĝoje akceptis. Baldaŭ la preparoj sukcesis tiom, ke la delegacio povis forlasi la havenon de Stettin je la 11. julio posttagmeze. Stettinaj kamaradoj akompanis nin ĝis la ŝipejo. La ŝipo havante la nomon "Preussen" estis destinita porti nin trans la maron al Leningrad. Antaŭ la forveturo multaj timigaj paroloj estigis ĉe la plimulto de la delegitoj aŭguran antaŭsenton rilate al la malbonfama marmalsano. Spertaj maristoj donis afablajn, malmultekostajn konsilojn por eviti ĝin. Finfine la ŝipo ekmoviĝis kaj glitis malrapide sur la Oder al la Baltika maro. Veturante nordorienten, baldaŭ la bordo subiĝis en la akvon. La akva amaso estis dum la tuta vojaĝo sufiĉe trankvila, nur kelkaj kamaradoj nepre devis nutri la mevojn per la enhavo de siaj stomakoj. Ju pli ni alproksimiĝis nordajn regionojn, des pli helaj la noktoj fariĝis. Oni eĉ povis legi kaj skribi sen lumo.

Post la veturado la ŝipo albordiĝis en Leningrad. Laŭlonge de la kajo premis sin grandaj amasoj de proletoj, kaj per laŭtaj salutvortoj ili esprimis sian ĝojon pri nia alveno. Dum la sonoj de la internacionalo ni elŝipigis nin, ĉiu sola akceptata per amikeca manpremo. Daŭris ne tre longe, kaj mi estis ĉirkaŭita de laboristoj esperantistaj, inter ili k-do Podkaminer, k-dino Bregmann kaj aliaj. Per fluaj paroloj ili esprimis sian ĝojon, ke du Esperantistoj estis inter la delegacio. Ĉar k-do Podkaminer jus havis libertempon, li volonte deklaris sin preta esti dum nia restado en Leningrad mia speciala tradukanto. Komence la rusaj kamaradoj pensis, ke Esperanto nur estas bona temppasigilo, sed baldaŭ ili mem konvinkiĝis pri la vera valoro.

Nia unua vojo kondukis nin al grandega Palaco de Laboro, en kiu estas la oficejoj de ĉiuj sindikatoj. La domo mem estas inda loko por la laboristaj unuiĝoj. En granda salono ni tagmanĝis, kaj poste ni faris rondiron tra la urbego. La strato de la 25. oktobro, eksa Nevski-Prospekt, havis tre detruitan aspekton. La pavimo montris multajn truojn; ĉiuloke laboristoj estis okupataj ripari la larĝan straton. Ni estis informitaj, ke lastjare grandega superakvo ŝanĝis kaj difektis la aspekton de la domaj fasadoj, sed precipe la stratojn. Ke oni estas tre fervora forigi la restaĵon de ĉi-tiu malfeliĉo, tio estis atestita de multaj renovigitaj domfrontoj.

La sekvintan tagon ni komencis nian specialan laboron, pro kiu ni estis senditaj ĉi-tien: La viziton de fabrikoj. Estas tre kompreneble, ke ni unue inspektis kaj ekzamenis la uzinon de niaj invitintoj, Putilov. Tiu-ĉi fabriko ludis gravan rolon dum la revoluciaj tagoj kaj portas hodiaŭ la fieran nomon: Krasni Putilovec-Ruĝa Putilovlaborejo. Ĉi-tie ni trovis ĉiujn laŭleĝajn instituciojn, kiel uzinkonsilantaro, ruĝa direktoro, produkcikunvenoj, produkcikomitatoj kaj aliaj. La labordaŭro estas por ĉiuj gelaboristoj ĝenerale 8 horoj potage, la laboristoj, kiuj estas okupitaj per malsaniga laboro, nur 6, samkiel la lernantoj de la fabriko. Libertempon ricevas la unua grupo 2 semajnojn, la dua kun la lernantoj 4. La teknika stato estas komparata kun tiu de germaniaj uzinoj malplibone, ne lastvice pro tio, ke antaŭmilite la tuta fabriko produktis militilojn. La celo de la administracio do estas la modernigo en ĉiuj partoj de la laborejo. La laboristoj, kiuj antaŭe ne tre interesiĝis pri la evoluo de sia laborloko, donis hodiaŭ ofte valorajn konsilojn koncerne plibonigon de maŝinoj kaj konstruaĵoj. Ofte okazis, ke ili faris inventojn, ties plimulto poste estis enkondukitaj en la fabriko mem. Estas vere, ke ankoraŭ tre multe mankas la modernaj maŝinoj, antaŭ ol oni povas diri ke ĉio estas bona. Sed necese estas, ke oni ĉiam dum la prijuĝo konsideru la malfacilaĵojn por Rusio dum la postrevoluciaj jaroj.

Entute mi povas diri, ke hodiaŭ la laboro enhavas alian sencon: Ili nur produktas por sia ŝtato, ĉiu progreso de la tuta industrio signifas plifortigon de proleta potenco kaj pli malgrandan verŝajnon de reveno de la kapitalista potenco.

(Daŭrigota)

W. Bennewitz. (2378)

Kun tiu ĉi numero de SENNACIULO finiĝas la UNUA JARKOLEKTO de la gazeto. Ni sukcesis unu jaron regule ĉiusemajne aperigi nian organon interligantan TUTMONDAN LABORISTAN ESPERANTISTARON. Bedaŭrinde mankis kaj mankas sufiĉa subteno, sufiĉa intereso flanke de la kamaradaro, kiu riskas per sia ekstrema pasiveco fiaskigi nian entreprenon. Esperante, ke tamen sufiĉe da VIVFORTO kaŝiĝas en nia movado, ni daŭrigas kuraĝe sur la ekirita vojo.

PASIS LA UNUA JARO DE NIA GAZETO — VIVU LA DUA! — Red.

Japana vilaĝo

Oleg Pletner

En unu el lastaj numeroj de japana ĵurnalo "Tjukoron" estas donita tre detala buĝeto de vilaĝano-farmisto kaj bienposedanto. Japana farmisto, laboranta sur bienposedanta tero, pagas por farmo ĝis 50% de sia rikolto. Sur unu parto de la tero kreskas rizo, sur restaĵo oni kulturas hordeon, legomon, morusarbon. Por ke riza kampo donu rikolton, laboro sur ĝi devas esti granda, ankaŭ elspezoj; sufiĉas diri, ke nur nutrado de tero por 1/2 desjatino*) kostas 68 rublojn. Per maksimuma peno kaj dum bona rikolto ĉi-tiu peceto da tero donas 30 sakojn da rizo, kiuj kostas 600 rub. Sed ĉi 600 r. ne restas en poŝo de la farmisto. 14 sakoj (280 r.) iras, kiel farma pago, al mastro. Tuta enspezo de la farmisto konsistas el 350 r., sed, per ili, certe ne povas jaron ekzisti familio okpersona. 350 r. ne kovras eĉ 50% da elspezoj, kiuj estas necesaj al ĝi por travivo. La farmisto devas iri kaj vendi siajn monojn al la sama bienposedanto, kiu prenis duonon el lia rikolto. Statistiko donas la ciferon de terkulturaj laboristoj ĝis 3500000 homoj.

Kion manĝas la farmisto krom rizo? Preskaŭ nenion. Viandon la tuta familio formanĝas dum jaro por 1 r., kaj fiŝon — 5 r. dum jaro. Tio por ok personoj! La regno kaj lokaj regantaroj el ĉi-buĝeto trovas rimedojn preni 11 r. kaj eklezio — 9 r. Tutaj elspezoj de bienposedanto sin esprimas en 7240 r. kaj de la farmisto — 620 r. Sekve, 15—20 familioj de farmistoj bone nutras familion de parazitoj. Kaj tiaj parazitantaj familioj estas ne malmultaj; laŭ takso — 900000.

Alkondukita ĝis lasta grado de mizero japana vilaĝo komencas degeneri. Kun ĉi-demando devis kunpuŝiĝi militaj regantaroj. La farita esploro ekmontris, ke el 100 kamparanoj en kelkaj vilaĝoj nur 10 estas tute sanaj. Preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj ĉirkaŭ maljuneco ricevas reŭmatismon, ĉar laboro en rizkampoj okazas ĝis genuoj en akvo. Precipe granda estas mortado de infanoj.

Kredito, donita de bankoj por restarigo de vilaĝoj, iras en manojn de la plej riĉa kamparanaro. Nuntempe 48,5% lokaj monsumoj estas elspezataj por lernejoj. La regno elspezas je klerigado por ĉiu deviga 40000000 rublojn, sed la vilaĝo donas 185 milionojn.

Diversaj grupoj proponas diversajn rimedojn por savi situacion: bienposedantoj postulas altajn prezojn por rizo, forgesante, ke tiam la vilaĝo pli rapide malriĉiĝos, ol riĉiĝos. Liberala kaj socialistema burĝaro, al kiu aperas fantomo de revolucio, proponas propravolan malgrandigon de rento, enkondukon de komuna kulturigo en kampoj kaj de plifortigita kooperacio.

La regno batalas kun kampara movado kaj penas levi kaj fortigi malgrandan posedanton, sed vicoj de lastaj maldensiĝas kun ĉiu jaro.

En profundan ruiniĝon venis la japana vilaĝo. Kaj ĉiuj rimedoj, nuntempe enkondukitaj, povas doni nur provizoran trankvilon. Estas necesa radikala rompado, kaj fari ĝin devas mem vilaĝano.

El "Sciigiloj de VCJK" trad.

S. Bojev (3458), Turkestan.

*) Rusa mezurilo por areo (1 d. = 109 1/4 a.).

Vivkondiĉoj de laboristoj en Bulgario.

Registaro kontraŭ laboristaj organizaĵoj. — Arbitreco de salajra politiko. — Malpliigo de salajroj, sekve malsatado.

Antaŭ jaroj la bulgaraj laboristoj iomete plibonigis sian staton. Tiam la laboristoj havis profesiajn organizaĵojn, per kiuj oni faris diversajn strikojn por plibonigo de la kondiĉoj. En siaj bataloj ili ankaŭ estis helpataj de siaj frataj organizaĵoj. Kaj eĉ la eksterlandaj fratoj sendis helpon al ili, kiom iliaj fortoj permesis. Sen helpo oni ne restis. Iliaj organizaĵoj kaj iliaj spiritaj gvidantoj pripensis kune kun la laboristoj pli gravajn demandojn. Sed tiama registaro estis konstitucia, kaj oni permesis al laboristoj, fondi laboristajn organizaĵojn, per kiuj oni povis batali kaj gardi sian ĉiutagan panon.

Sed nuna registaro estas kontraŭkonstitucia, kaj oni tage kaj nokte pripensis la demandon, kiamaniere oni povus detrui la laboristajn profesiajn organizaĵojn kaj post tio plene sufoki la laboristan movadon en Bulgario. Oni eltrovis novajn leĝojn kontraŭ laboristaro, per kiuj oni malpermesis al laboristoj proprajn profesiajn organizaĵojn. Ĉiuj pli viglaj laboristoj estis ĵetitaj en malliberejon, kaj oni rajtis senkapigi ilin.

Ankaŭ oni malpermesis al laboristoj eldoni proprajn gazetojn, por ke ili ne plu publikigu la malbonajn aferojn faratajn de registaro kaj fabrikantoj. Laboristo, kiu arogas diri ion malbonan pri kapitalistoj, estas tuj arestata.

La bulgara registaro permesis al fabrikposedantoj, malpliigi la salajrojn de laboristoj laŭvole, kaj oni decidis, de 15. aŭgusto malpliigi la laborist-salajrojn ĝenerale po dek procentoj. Tamen la registaro al laboristoj promesas, ke ĝi volas zorgi, ke fabrikantoj ne malpliigu la salajrojn. Sed la fabrikantoj respondis al la registaro, ke ili ne povas eviti malpliigi la salajrojn. Nun la registaro silentas, nur ĝiaj lakeoj klopodas antaŭ la laboristoj klarigi, ke nuna registaro laboras por ilia bono. Kaj oni intencis fondi "neŭtralan tabak-laboristan organizaĵon", pri kiu zorgus iomete la bulgara registaro. En unua kunveno oni pripensis kune kun la laboristoj la demandon, kiamaniere trovi vojon, por eliri el tiu ĉi stato. Kaj kiam la laboristoj komencis paroli pri diversaj demandoj kaj ne konsentis kun la proponoj de la fabrikist-agentoj, oni komencis aresti ĉiun laboriston, kiu parolis kontraŭ ili.

Post malpliigo de la salajroj la tabaklaboristoj nur povas aĉeti sekan panon kaj du kilogramojn da terpomoj. Tamen la ministroj diras en eksterlando, ke la laboristoj jam estas kontentaj kaj ne protestos. Vane! la laboristoj scias bone ilian politikon. *Z. Dravejkin.*

EL ANGOLA

VIVO K. MOROJ DE INDIĜENOJ

II.

La indiĝena industrio estas treege elementa: kelkaj ujoj el argilo — potoj, trogoj kaj akvoboteloj — neperfekte modelitaj permane, kuleroj, teleroj kaj pipoj faritaj el ligno kaj ofte ankaŭ el korno, la uzata de ili meblaro — kiu preskaŭ resumiĝas en la lignaj skabeloj, la "kinda"j (malgrandaj korboj malaltaj) el interplektitaj folioj aŭ arboŝeloj kaj la matoj, sur kiuj ili kutimas dormkuŝiĝi, ŝnuroj el fibroj kaj laste, iliaj muzikiloj. En diversaj lokoj troviĝas kelkaj lertaj forĝistoj sin okupantaj je farado de indiĝenaj fosiloj, tranĉiloj kaj hakiloj kaj tanistoj, kiuj preparas felojn por tamburoj, zonumoj kaj sandaloj. La teksindustrio ne estas tute nekonata, ĉar ili ofte produktas, per primitivaj teksiloj, krudajn kotondrapojn.

Iliaj loĝejoj estas ĝenerale tre malvastaj kaj malpuregaj. La groto aŭ la "ŝing" — mizerega kabano konusforma tre malgranda kaj konsistanta el kelkaj trunketoj malbone kovritaj per pajlo — prezentas ankoraŭ la tutan loĝkomforton de grandega parto el la indiĝenaro. Sed, plej ofte, ili konstruas siajn domojn duĉambre, kun muroj el argilo manplate algluita sur reto de interplektitaj trunketoj, kiun kovras zorge farita pajla tegmento. Ĉi domoj estas plej ofte rektangulaj kun tegmento duakva, sed oni trovas ankaŭ da ili, en kelkaj regionoj, cilindroformajn kun konusa tegmento.

En ĉiuj loĝejoj, kiel meblaro apenaŭ ekzistas kvazaŭlito el interplektitaj vipoj apogitaj sur kvar trunketoj forkoformaj, kelkaj skabeloj aŭ benkoj el ununura peco, kaj du aŭ tri lignaj kestoj, en kiuj ili konservas la tutan riĉaĵon de la familio.

La domoj, arigitaj laŭ neregulaj vilaĝetoj ("libata") suprenrampas la deklivojn de l' montoj aŭ emajligas ties supraĵon kun ĉiam en la mezo staranta "kubata" (indiĝena domo) de la estro. Kaj, ĉar lia loĝejo estas malvasta kaj la nigrulo ankaŭ ŝatas ĝui la spiritoripozon, jen ni trovas, ekzemple en la regiono *Libolu* la "nĵiangu"n, aŭ klubon de la "libata", en kiu la viroj renkontiĝas por ludi, fumi aŭ interbabili pri la dumtagaj okazintaĵoj.

En tio, kio koncernas la vestaĵojn, la kotonaj drapoj importitaj de la komercistoj jam ekanstataŭas (aŭ, plej ĝuste, ekkovras) la mallarĝan "tanga"n (kvazaŭjupeto) de la viroj kaj la malgrandan *ĉastantaŭtukon* de la virinoj. Sed la tradicio ankoraŭ instigas la indiĝenojn konservi sub la drapoj (plej bone dirite: vestaĵtukoj) la primitivan kovrilon de la hontigaj partoj de sia korpo. Tamen, ankoraŭ nun estas

troveblaj multege da genigruloj sin kovrantaj nur per malgranda felo aŭ interŝelo de iaj arboj pendanta el la zonumo aŭ el simpla ŝnureto super la generaj partoj. Ĉapelon la indiĝeno nur tre malofte uzas. Sub la plej varmegaj sunradioj, ofte dum marŝadoj daŭrantaj kelkajn semajnojn, li iras ĝenerale nudkape kaj ĉiam nudpiede ĉar li, ja, ne scias porti ŝuojn aŭ botojn. Kiam li estas soldato, li prezentiĝas ĉiam nudpiede eĉ en la oficialaj ceremonioj.

La dandismo de la nigruloj konsistas preskaŭ ekskluzive en la korpokripligoj aŭ en la ornamaĵoj. La indiĝenoj *Ba-Sele*[1]) tatuiĝas per pikvundoj sur la facoj kaj frunto kaj per tranĉvundoj sur la brusto, trametas peceton da ligno tra la nazan mezan membranon, samkiel la Papuuloj aŭ la Aŭstraloj, pintefajlas la dentojn, metas ringojn en ĉiuj fingroj, uzas metalajn aŭ ledajn braceletojn ĉirkaŭ ambaŭ pulsoj kaj la virinoj uzas orelringetojn, ĉirkaŭkolojn el vitrobuletoj kaj aluminiajn medalojn pendantajn de la kolo kaj ŝnurajn zonumojn ĉirkaŭpremantajn ilin ĉe la lumbo.

La *Ba-Nanu* ne tatuiĝas sur la facoj sed nur detranĉas la du suprajn incizivdentojn.

La nigruloj el *Amboim* uzas kripligojn tre similajn al tiuj de la *Ba-Sele*, sed troviĝas pli da koketeco ĉe la virinoj, kiuj sin ornamas per vitrobuletoj sur la kunplektita hararo, sur la oreloj, kolo, brakoj, pulsoj kaj eĉ sur la zono kaj ankaŭ uzas metalajn orel- kaj pulsoringojn manlaboritajn de la viroj.

Tiuj el *Kibala* tatuiĝas ankaŭ per pik- kaj tranĉvundoj kolorigitaj per fumnigraĵo kaj palmoleo. Ili fajlas pintforme la suprajn incizivajn dentojn kaj la virinoj ornamiĝas kovrante la kunplektitan hararon per vitrobuletoj kaj flavaj najloj, uzante lignopecetojn metitajn tra la oreloj kaj multe da enfadenigitaj vitrobuletoj ĉirkaŭ la kolo, la zono kaj eĉ ĉirkaŭ la maleoloj.

La indiĝenoj el *Musende* pike tatuiĝas kaj uzas, kiel kolorigilo, la foliojn de la tomato pistitajn kun kaŭĉuka cindro. Ili fajlas nur la suprajn incizivojn M-forme. La virinoj distingiĝas speciale pro malpurigemo kaj absoluta manko de ĉiu koketaĵo.

Inter la raso *Libolu* la tatuiĝo, akirita per tranĉvundoj aŭ kudrilpikaĵoj kolorigitaj per karbopolvo, estas pli ofta ĉe la virinoj ol ĉe la viroj. Ĉiuj incizivaj dentoj estas pinte fajlitaj, sed ankaŭ estas troveblaj indiĝenoj fajlintaj nur la suprajn dentojn. Ili ornamiĝas per enfadenigitaj vitrobuletoj aŭ konkoj, ringoj ĉirkaŭ la pulsoj kaj la maleoloj. La virinoj uzas plue ledan zonumon („kababu“) ornamitan per malgrandaj konkoj.

En *Bengela Velja* la viroj praktikas la tatuiĝon sur la antaŭbrako kaj la virinoj sur la frunto kaj facoj formante krucon aŭ kapricajn desegnaĵojn. Ĉi-uzado, tamen, estas tre malofta ĉe ili.

La *Ba-Pinda*, samkiel la *Ba-Sele* kaj *Amboim* fajlas pintforme ĉiujn incizivojn, sed tiu kutimo ŝajne ne ekzistas inter la indiĝenoj *Kisama*, kiuj loĝas en la sama regiono. Inter la *Ba-Pinda* la virinoj ornamiĝas per larĝaj ringoj el fero aŭ latuno ĉirkaŭ la pulsoj, vitrobuletoj ĉirkaŭ la kolo, maleoloj kaj zono. La *Amboim* loĝantaj la saman regionon, uzas, samkiel la virinoj feroringojn ĉirkaŭ la pulsoj kaj la virinoj, krom la ornamaĵoj jam indikitaj, metas ĉirkaŭ la kolon mallarĝan ledrimenon kun latuna riglilo. Siaflanke, la *Kisama*, multe pli dandemaj, uzas, samkiel la virinoj, vitrobuletojn ĉirkaŭ la pulsoj kaj koloj kaj dise kunplektas la hararon, kiun ili ornamas per vitrobuletoj, blankaj butonoj kaj malgrandaj de ili faritaj kuproplatoj.

La *Ba-Sumbe* estas tiuj, kiuj plej malofte uzas la dandismon de la kripligoj kaj nur ĉe la virinoj oni trovas la seksan naturtendencon por la koketemo. Ĉilastaj uzas ĉirkaŭkolojn blankajn, bluajn aŭ ruĝajn, latunajn aŭ blankmetalajn ringojn ĉe la brakoj kaj ĉe la kruroj kaj malgrandan nigran ornamitan drapopecon sur la kapo.

J. P. B.

1) Ĉiuj vortoj komencantaj per "*Ba*" montras indiĝenajn rasojn el difinita regiono indikita per la cetera parto de la vorto. Ekz.: "*Ba-Sele*", raso loĝanta en regiono *Sele* (aŭ *Seles*); *Ba-Pinda*, raso el regiono *Pinda*.

TRA LA KLASBATALO

En London (Islington) okazis interpuŝiĝoj inter anglaj faŝistoj kaj komunistoj, ĉe kiuj kelkaj personoj estis vunditaj.

En Heidelberg okazas kongreso de la Germana Socialdemokrata Partio.

En la provinco Ŝantung (Ĉinio) dronis pro superakvegoj 3000 homoj.

La Labor-Esplor-Fako (L. R. D.) starigis gravan enketon pri profito, salajro k. t. p. pagita en la 20a centjaro. Ĵus ĝi eldonis la rezulton. Kompare al 1900 la reala enspezo de la brita laboristaro malpligrandiĝis kaj nun estas 4/5 (kvar kvinonoj). Kontraŭe la sumo de procento el kapitalo duobliĝis en 1900—1925.

K-doj Tomski kaj Dogadov ĉeestis la ĉi-jaran konferencon de la Brita Laborist-Sindikataro (sept. 7—12). Temas pri la rilatoj inter la Soveta Sindikataro kaj la I.F.T.U. (Amsterdama Internacio), ankaŭ pri preparo per koncentrita forto de la Ekzekutivo kontraŭ la atako, kiu venos en la printempo kredeble de la karbposedantoj.

Lasta novaĵo

Je la Sindikata Kongreso en Scarborough (T. U. C.) ĵaŭde, 10an sept. oni akceptis rezolucion de la Amalgamated Engineering Union, kiu ordonas ke la Ĝenerala Konsilantaro devas akcepti Esperanton kiel la Oficialan Internacian Lingvon. Samokaze tiu konsilantaro devas insisti ke ĉiu eduka organizaĵo, kiu estas alfiliata al la kongreso, enkonduku la lingvon en la lernprogramon.

Pli da Iniciativo!

Kamaradoj! Ĉu vi atendas pli da sukcesoj, pli da rezultoj en nia movado, kiam vi malagemas, kiam via grupa vivo malviglas, kiam vi ne faras propagandon por SAT kaj ĝiaj organoj? La Historio instruas nin, ke ĉiu movado nur povas kreski kaj pluevolui dank' al la sinoferemo de pioniroj. Vi, marksanoj, anoj de historia materialismo, ĉu vi forgesis la instruojn de la Historio? Ĉu vi pensas, ke la laborista esp. movado povos prosperi kaj plukreski sen via ekstrema aktiveco kaj agitemo? En la Kongreso de Vieno oni parolis tre klare kaj malreveme, sed oni tamen ĉiam antaŭ si havis en spirito la bildon de SAT kiel amas-organizaĵo.

Ĉu vi *nenion tiucele volas entrepreni? Ke viaj organoj estu legataj de miloj da novaj abonantoj, ke via Jarlibro entenu adresojn de multaj miloj da laboristoj ĉiulandaj? Kamaradoj! La V. Kongreso starigis tre klaran programon, la V. Kongreso ebenigis al vi la vojon, plifaciligis vian laboron, desegnante grandskale la situacion kaj ĝiajn necesajn konsekvencojn, la V. Kongreso estis simbolo de unueco kaj kreis unuecan agbazon. Kamaradoj! Mankas ankoraŭ via konsento al tiuj decidoj, mankas ankoraŭ via manpremo en la prezentitan manon. Donu ĝin en la formo de plifortigita aktiveco kaj vigleco!*

Ne mankas ja la direktivoj. Diru, kion vi intencas fari dum la vintra sezono en via loko, en via urbo, en via regiono? Ĉu ĉiuj, kiuj iom scipovas nian lingvon, kiuj iom partoprenas en la grupa vivo, estas jam varbitaj por SAT, estas jam legantoj de "Sennaciulo" aŭ "S. R."? Al la malnovaj pioniroj en nia movado kaj al la novaj, freŝe al ni venintaj aktivuloj kun laborema spirito ni turnas nin kun la voko:

PLI DA INICIATIVO!

Informo pri Radio-Paroladoj

La vicaj esperantlingvaj radioparoladoj, transdonotaj el Moskvo per la stacio je la nomo de Komintern, okazos:

Septembro: 24
Oktobro: 15; 29
Novembro: 12; 26
Decembro: 10; 24

Ondlongo — 1450 m., tempo: 13.10 — 13.55 laŭ MET. K-doj ne forgesu organizi aŭskultadon en tiuj tagoj kaj komuniki pri la aŭdebleco al Radio-sekcio de SEU, Moskvo, Poŝtkesto 630.

15-an de Oktobro komenciĝas nova radio-kurso de Esp-o, aranĝata de MGSPS (Moskva Gubernia Sindikat-Komitato) per la radio-stacio je la nomo de POPOV. Ĝi okazos dufoje semajne, supozate lunde kaj vendrede, per la ondo 1050 m.

Subtenu vian gazeton!
Varbu novajn abonantojn!

AMIKAJ LETEROJ

1. Kelkaj rezultoj de laboristaj ekskursoj al Sovet-Unio.

Mi ne intencas skribi hodiaŭ pri la granda signifo de laboristaj ekskursoj al Sovetio, dum kiuj krevas la burĝaj mensogoj kaj kreskas la sennacieca solidareco de laboristaro diverslanda.

Ankaŭ ne estas mia celo rakonti hodiaŭ, kiel utilis al la ekskursintoj Esp-o kaj kiomgrade ĝi estas praktikebla por alilanda laboristo en Sovetio. Tion scipovos fari la ekskursintoj mem kaj iliaj atestoj estos certe multe pli valoraj.

Mi celas tie ĉi rakonti, kiel multe helpis al ni, al sovetiaj esp-istoj, venintaj el eksterlando k-doj, kiel multe ili helpis al la proleta esp-movado en Sovetio.

Mi ne bezonas multajn argumentojn por pruvi tion. Mi nur citos el multenombraj ĵurnaloj de nia vasta lando. Ĵurnalaro ludas gravan rolon en propagando de diversaj ideoj. Kaj jen sovetia ĵurnalaro, dank' al ekskursoj de alilandaj laboristoj, propagandis esp-on pli multe kaj pli efike ol iam antaŭe.

Vi verŝajne ofte penis enpresi en via loka ĵurnalo iun noton pri esp-o, pri ĝia praktikeblo kaj pri ĝia valoro. Kaj same verŝajne viaj penoj ne venigas al necesa rezulto. Oni ja ne atentas teoriojn . . .

Sed jen k-do Whitam, teksisto el Anglio, venas al Ivanovo-Voznesensk (unu el centroj de teksindustrio en Sovetio) kaj la loka ĵurnalo "Raboĉij Kraj", N-o 174, raportas pri tiu fakto, atentigante ke k-don Whitam helpis nur esp-o dum lia ekskurso kaj renkontiĝo kun sovetiaj laboristoj kaj konkludas:

". . . tiamaniere la artefarita internacia lingvo fariĝas vivanta rimedo de interligo por laboristoj diverslandaj".

La ĵurnalo kaj ĝia legantaro per tio konvinkiĝas, ke "Esp-o rompas la naciajn barojn", kiel titolis la noton la ĵurnalo.

Post du semajnoj, jam forveturante, k-do Whitam en sia letero al la redakcio de la nomita ĵurnalo priskribas siajn impresojn kaj atentigas ke "nur per helpo de Esp-o mi povis viziti vian landon, sciante neniun rusan vorton. Miajn observojn mi povis fari ankaŭ nur per helpo de tiu ĉi lingvo" . . . (La sama ĵurnalo, N-o 184).

Tiflisa ĵurnalo "Raboĉaja Pravda". K-doj el Tiflis plendis ke ĝi tre nevolonte akceptas eĉ malgrandajn notojn pri Esp-o. Venas la germana laborista delegitaro kaj inter ĝi nia k-do Bennewitz. "Raboĉaja Pravda" enpresas kliŝon de lia esperantlingva letero al laboristoj de Tiflisa elektrostacio (N-o 1811) kaj speciale atentigas ke la letero estas skribita en esperanto. Sur la sama paĝo ni legas pri demonstrado de Tiflisaj laboristoj por saluti la germanajn k-dojn. Laborista korespondanto rakontas bildece en tiu ĉi artikolo:

"K-don Bennewitz sieĝas laboristaj korespondantoj, proponante al li multenombrajn demandojn:

— K-do Bennewitz, verku artikoleton por la ĵurnalo Martakoĉ" — diras esperantlingve laborista korespondanto . . ."

Skeptikuloj, vi interrompas min tie ĉi: ĉu valoras do citi iun lokon kie okaze estis uzita la vorto "esperanto"?

Sed tie ĉi temas ne pri la vorto. Jen hodiaŭ mi legis raportojn pri la festena kunsido okaze de la 200-jara jubileo de Scienca Akademio en Leningrad:

"Sian salutparoladon la prezidanto de l' Akademio faris en franca lingvo . . ."

Kaj paralele al tio mi rememoras la vivplenan laboristan korespondaĵon en Odessa "Izvestija", N-o 1665, kie estas transdonata jena interparolo de havenaj ŝarĝlaboristoj:

"— Kaj tamen mi tre deziras ekscii, kiamaniere Odessaj laborist-korespondantoj havas ligon kun niaj alilandaj fratoj?

— Tio estas ebla . . . Necesas nur lerni la internacian lingvon - Esperanto kaj en ĝi skribi eksterlanden . . ."

Vi komprenas tiun abismon inter la franca lingvo de solena Akademia festeno kaj esperanto de laborista interligo internacia? Vi komprenas kiom multe signifas tiuj vortoj "parolas esperantlingve laborista korespondanto?"

Mi ne deziras esti tro longa. Mi simple citos ankoraŭ, ke "Tverskaja Pravda" (Tver, N-o 165) rakontas detale pri renkontiĝo de lokaj esp-istoj kun nia sveda k-do J. Nilsson; mi citos la publikan leteron de instruista delegitaro, presitan en Moskvaj "Izvestija" kaj "Komsomolskaja Pravda" 22. VII; en tiu ĉi longa letero la instruistaj k-doj atentigas pri esp-o kaj la servo peresp-a, rakontas pri sia vizito al k-do Lunaĉarskij, kiu konfesis al ili ke li rekonas la grandan rolon de lingvo internacia. La letero finiĝas per jenaj linioj:

"Nia sincera deziro estas, ke Narkompros en plej proksima tempo solvu la problemon pri enkonduko de Esp-o en lernejojn. Ankaŭ tie ĉi Soveta Rusio montru indan ekzemplon por aliaj landoj".

Mi citos ankoraŭ la leteron de k-do Bennewitz al proletaro de Transkaŭkazio, presitan en centra tiea ĵurnalo "Zarja Vostoka". Priskribante siajn impresojn, k-do Bennewitz parolas pri lingvaj malhelpaĵoj kaj finas:

„. . . mi scias nek la rusan, nek kartvelan lingvojn. Sed mi parolas internacian lingvon Esperanto kaj mi esperas, ke proksimtempe rusaj kaj kartvelaj laboristoj bone utiligos ĝin por ligiĝi kun alilandaj laboristoj".

Mi povus citi ankoraŭ kelkajn ĵurnalojn, sed mi preferas subteni k-don Lorencson: ni devas atenti laboristajn ekskursojn, precipe tiujn al Sovetio, ni devas organizite partopreni en ili, aplikante dum ili nian lingvon, ĉar ni pli kaj pli konvinkiĝas ke tiu praktikado plej multe helpas al disvastiĝo de nia lingvo.

Kaj nevole mi rememoras antaŭdiron de k-do Sosnovski (S. 26), ke "se ne hodiaŭ do morgaŭ ekfluos per granda torento la amasaj ekskursoj de laboristoj el USSR eksterlanden kaj inverse" kaj ke grandan valoron havos Esp-o por tiuj laboristaj ekskursoj.

Kaj same nevole mi rememoras la flugfolion de idistaj k-doj (vidu S. 47), en kiu ili represante ĉi antaŭdiron aldonis post la vorto "esperanto" sian redakcian interkrampaĵon "(ankaŭ Ido)".

La ekskursoj jam komenciĝis. La prognozo de k-do Sosnovski jam efektiviĝas. La reala interfratiĝo laborista jam okazas, plifirmigante la unuecon de laborista movado. Esp-o praktike servas al tiu interfratiĝo. Kaj la interkrampa komento "ankaŭ Ido"? Ve, neniu el la delegitaroj vizitintaj Sovetion, enhavis, almenaŭ enkrampe, iun Ido-posedantan laboriston.

Kial? Verŝajne, ĉar Ido estas tro science-perfektigita por servi simplan laboriston. Ja nevane k-do Marmur el Suĥum en aŭgusta numero de la svisa "Ido" kriegas al sia Akademio: ĉesu pliperfektigi, atendu fari pliajn perfektigojn — por laboristo jam estas malfacile lerni la lingvon!

Sed ĉu oni povas ĉesi la sciencan perfektigadon, se la lingvo ne estas ankoraŭ sufiĉe perfekta por esti uzata dum Akademiaj jubile-solenoj?

Kaj dume vi, k-do Bennewitz, k-do Nilsson kaj multaj, multaj aliaj miaj konatuloj pro viaj vizitoj al Moskvo, preferas uzi la "primitivan", ĉu ne?

6. IX. 1925. *Ulo el Moskvo.*

Laborista korespondanto — laboristo kiu kunlaboras en loka ĵurnalo, samtempe ne ĉesigante sian fabrikan laboron laŭprofesian. Ordinaraj temoj de ilia kunlaborado — vivo kaj stato de sia fabriko.

Promenoj kaj promenetoj sur marĝenoj de esperantaj gazetoj

20. Unu el la promenoj inter muzemanekenoj[1])

"Centra Komitato de Sovietlanda Esperantista Unuiĝo publikigis proteston kontraŭ XVII. universala kongreso, okazonta en Ĝenevo en 1925 jaro. Ion similan esperantista historio renkontas unuan fojon . . . La protesto havas aplombon kaj kuraĝon trakti Svisujon, tradician kaj historian landon de libereco, kiel landon "kie ne povas esti garantiata per la ekzistanta sociordo kaj ekzistantaj leĝoj vivo kaj sekureco por la sovietaj civitanoj" . . ."

Tiujn ĉi liniojn ni legas en "Pola Esperantisto" — Januaro/Februaro 1925. Ni ne diskutu, ĉu prave faris Sov. Esp. Unuiĝo. Eble ne. Sed nin interesas, kiu muŝo pinĉis "Polan Esp.", ke ĝi atentis tiun ĉi sensacion? Ĉu ĝi ne mem unua protestis kontraŭ kunvoko de la XV. kongreso en Germanujo en 1923, ĉar tie "vivo de alilandulo ne apartenas al agrablaj" (vidu "Pola Esp." Aprilo 1923)? Evidentas, ke la esperantista historio jam havis "ion similan" je du jaroj pli frue.

---

[1]) artikfiguro (marioneto).

Sed ni revenu al la temo. "Pola Esp." defendas Svisujon kaj kontraŭe akuzas Sovetlandon, kie "rajto de civitano, lia vivo, libereco, digno kaj havaĵo" — (havaĵo!) — "estas reduktitaj al minimumo! . . . Sufiĉas mencii patriarkon Tiĥon, mortigitan prelaton Budkiewicz, ĉefepiskopon Cieplak . . ."

Ni devas rimarkigi jenon: 1. Tiĥon mem pentis pri tio ke li okupiĝis pri politika kontraŭrevolucio anstataŭ zorgi pri la ĉiela spirita savo kaj mem testamentis al la tuta rusa ortodoksa kristanaro esti lojalaj sovetcivitanoj; 2. Budkiewicz mem konfesis sian krimagadon kontraŭ la sovetaj organoj de la administrado; 3. Cieplak mem post sia veno al Polujo atestis tute humanan traktadon al li dum lia restado en la soveta karcero. Se plaĉos al "Pola Esp.", ni povas daŭrigi la liston per la sadisto pastro Usas kaj aliaj "sanktaj" ekleziuloj (nur ilin "Pola Esp." mencias), kiujn ĝi metas sub sian protekton kontraŭ la abomena ateista bolŝevistaro.

Se ni rememoros la fakton, pro kiu Sovet-Unio de la respublikoj bojkotas Svisujon, ni vidos tute rimarkindan bildon: sinjoro Konradi, negocisto kaj diboĉulo, pro fakta mortigo (!) de la oficiala soveta ŝtatreprezentanto (!!) estis pravigita (!!!) de la svisa juĝistaro, malgraŭ ke unu monaton poste — nure pro atenco (!!!!) en diboĉa stato kontraŭ kabareda dancistino (!!!!!) li estis kondamnita por unu monato da puno (!!!!!!). Tre konsiderinda diferenco inter la kultura svisa "libereco" kaj la "barbara" bolŝevista sociordo!

Neimageble fantazie "Pola Esp." prezentas al si kaj al la legantaro Sovetlandon:

> "En Sovetlando libereco ne ekzistas, esperantistoj kaj ilia movado estas same kiel tuta socia vivo en Sovetlando katenigitaj . . . Ni ja konas ruslandajn esperantistojn el la tempo antaŭsoveta. Ni estas certaj pri ili. Ili . . . avidas spiri almenaŭ iom da libera aero, ĉar Sovietlando sufokigas ilin. Sed bedaŭrinde nun ili tion nek fari, nek diri, eble eĉ nek pensi povas". . .

Ni ĉiuj scias, kiom multe progresas esperanto nun en Ruslando, tre ŝatinde superinte sian antaŭsovetan staton, antaŭ ol tiu estis detruita de la milita epoko. La pensmanieron de la rusaj esperantistoj ni ĉiuj povas fidinde konstati laŭ la senperaj informoj el Sovetlando mem. Ni ĉiuj vidas ke la ruslandaj esperantistoj tre bone spiras kaj estas tre aktivaj. Kaj ankaŭ okulvidebla estas la grandega diferenco inter la nuna Soveta Unio de la Respublikoj kaj la iama Ruslando. Trakti pri Sovetlando laŭ la iama malnova antaŭrevolucia antaŭdekjara tempo estas strangaĵo. Cetere "Pola Esp." propramane karakterizas sin mem kaj sian arĥaikan esencon (vidu la fruntartikolon en "Pola Esp." — Marto 1925):

> "Ĝenerale, ni, malnovaj esperantistoj en Warszawa, sentas nin tre strange de ia tempo . . . . Antaŭe ni naive kredis, ke ni mem ion kapablas; nun, kun ĉiu tago fariĝas al ni pli klare, ke ni estas tipoj, taŭgaj por plenŝtopo kaj elstarigo en muzea fenestro!"

Tion ĉi ni tre volonte konsentas kaj havas nenion por aldoni al la perfekta aŭtoportreto.

Moskvulo.

El la Vivo kaj Scienco

Evolucio, Kapitalismo kaj Laboristaro

La proceso surscenigita en Dayton, Tennessee (Tenesi), el ĉiuj modernaj landoj kapitalistaj, povis okazi nur en Usono.

Ĉar Johano Scopes, instruisto en publika lernejo, povis esti kondukita juĝejon pro evoluci-instruado kiel natura leĝo, evidentiĝas la malprogresema evoluiĝo de tuta sekcio usona.

La suda parto usona ne estas ankoraŭ industriigita. Ĝi estas intelekte superegata de feŭdaj konceptoj, kiujn oni ne trovas en la grandaj industrirondoj, kie la amasoj estas aŭ senreligiecaj aŭ apatiecaj kontraŭ ortodoksa religio.

Estas notinde ke la grandaj metropolaj ĵurnaloj enviciĝas evoluciflanke. La proceso Scopes oferis al ili bonegan ŝancon por elmontri sian sindediĉemon al scienca vero — vero apartigita de klasbatalo.

Ekstaranta kapitalismo alportis Reformacion — la limigoj kiuj estis metitaj al sendependa serĉado de religio feŭda, malfaciligis komercan progreson, kaj la komerca klaso rompis la potencon de la roma eklezio. Tielgrade kiel eklezio ortodoksa estis utila al kapitalismo, ĝi estis akcelata, sed al la etikoj kristanismaj neniam estis permesate malhelpi negocon — la burĝaro havas du kodojn, kiel Lafargue antaŭlonge klarigis:

Unu por komerco kaj unu por sia privata vivo.

Inter la du ĉiama batalo ekzistas, kun rezultato, ke la plej bonaj negocistoj estas la plej grandaj hipokrituloj.

Sed returne al Dayton.

Tre interesa estas por laborula klaso ti-kio okazis en tiu montara urbeto, kie reakcio feŭda estas reganta. Ambaŭ, la defendantoj kaj la persekutantoj de Scopes, estas mezklasuloj. El tio evidentiĝas, ke inter tiu klaso ekzistas profunda opinimalsameco.

Darrow[1]) estas tipa mezklasulo, liberalulo, profesia intelektulo — individueca, kredanto je persona libereco, edukita kaj kulturita.

Bryan[2]) reprezentis la agraran parton de la mezklaso — li estis la gvidisto de bonstataj farmistoj de la mezokcidento kaj sudo, kies interesoj ekonomiaj opozicias la interesojn de granda kapitalistaro — la parto kies anoj ĉiam "krucmilitadas" pro iu ajn ĥimera moncirkulad-projekto tiamaniere montrante sian antagonismon al la pligrandiĝanta kontrolo de industrio kaj financo je la parto de kapitalistoj.

La urbego kaj la urbeto — jen la du fortoj opoziciantaj unu la alian en Dayton, — kaj estas notinde ke Bryan atentigis la kampulojn pri la mokado, kiun la metropola gazetaro elverŝas kontraŭ ili; tiamaniere li defendis la dogmon de kreanto, de specialaj kreitaĵoj kaj de la unua ĉapitro de Genezo.[1])

En Grand-Britio tia lukto estis finbatalita dum 1880—1890. La kompleta venko de la brita kapitalismo kontraŭ feŭdalismo simboliĝis per ega industri-ekspansiiĝo kaj per ekstaro de industria kapitalismo kun proletigo de la superega plimulto de amasoj britaj kaj estis sekvita de racionalisma disvastiĝo pere de presado kaj distribuado de milionoj da pamfletoj pri Darwina teorio; pamfletoj de Lyell, Huxley, McCabe, Allen; verkaĵoj de Leckie kaj Haeckel, Lubbock kaj Romanes.

Sed ne ĝis la superreganta klaso kapitalista trovis en Darwina teorio de la "Postvivo de la plej taŭgaj" pravigon por sia subpremado de la laborista klaso, tiu opozicio kontraŭ la evolucia teorio iĝis nekonsiderinda en Anglio. La ĝangala[2]) leĝo de "dentego kaj ungego" ŝajnis al ili esti tre taŭga por ilia periodo. Naturo mem surmetis la konsent-sigelon sur la britan kapitalismon kaj ĉiun ĝian plenumaĵon, — ili asertis, — kaj tiu distordita Darwinismo iĝis la kvazaŭ dorlotita karulo de la karbo kaj ŝtalo-lordoj.

Estas bone konfesi ĉi tie ke kapitalismo, se iam ajn, tre malofte malhelpas serĉadon por vero abstrakta. Serĉadoj sciencaj pri fiziko, ĥemio, biologio, antropologio, astronomio, geologio kaj aliaj sciencoj estas subtenataj. Nur se temas pri sciencoj sociologiaj, kie la klas-karaktero socia estas montrata de ĉiu vereca esploranto, tiam la klaso reganta kontraŭstaras. Libereco akademia estas nur tiam malpliigata kiam la rezultatoj de serĉado scienca tendencas malkovri la hipokritecon kaj kruelecon de la klaso reganta, por tiamaniere malfortigi ĝin kaj plifortigi la klason laboristan.

Moderna scienco estas servisto de kapitalisma produktado kaj tian valoran serviston ĝi ne detruos.

Se ni deziras pruvi al ni, ke estas vero abstrakta, sed ne libereco socia, kiun la gazetaro metropola defendis en la Scopes-proceso, ni nur devas kompari la kvanton kaj kvaliton de publikeco, donitan al alia antaŭnelonge okazinta proceso — la Gitlow[1]) proceso.

Jen estis klas-proceso. La afero estis la konstitucia rajto rekomendadi la renverson de amerika registaro kapitalista por anstataŭ ĝi starigi registaron laboristkamparanan.

Per kelkaj plummovoj la usona juĝejo superega forviŝis la konstitucian garantiaĵon de libera parolado.

Ĝi laŭleĝigis persekutadon laŭ leĝo "krimeca 'sindikatismo' aŭ 'anarkismo'" en

---

[1]) Clarence Darrow estas la tre eminenta advokato, kiu defendis Scopes.

[2]) William Jennings Bryan estas fama politikisto kaj absolut-kredanto je biblio; persekutas Scopes (dume mortinta).

---

[1]) Historio de la biblio pri Kreo de mondo.

[2]) Sovaĝ-densejo, primitiv-arbaro.

35 ŝtatoj kaj endanĝerigis la tutan laboristan klason.

De la gazetaro kapitalista, kiu aŭ mallaŭdas aŭ ridindigas la persekutadon de Scopes, venis arego da aproboj pro la verdikto en Gitlow-proceso.

Estas unu plua afero en la Scopes proceso kaj la kontraŭ-evolucia leĝo, kiu havas grandan signifon por la laborula klaso. Ni povas esti certaj ke malgraŭ la sindonemo al veroj abstraktaj montritaj de kapitalista gazetaro, se la leĝo de Tennessee estos subtenata kaj kiam aliaj ŝtatoj akceptos similajn, tiuj leĝoj estos libere uzataj de la kapitalista klaso por subpremi ĉiun edukecan laboron havantan socian signifon.

Same kiel la krimec-sindikatismaj leĝoj estis akceptitaj kiel milit-rimedoj por la bridĉenado de "malamik-fremduloj" kaj poste uzataj kontraŭ la laborula klaso, samtiel kontraŭ-evoluciaj leĝoj estiĝos kiel alia rimedo por enkarcerigo de la plej inteligentaj kaj militemaj gelaboristoj.

Vokitaj por tiu celo ili estos akceptataj laŭde anstataŭ malaprobe de la kapitalista gazetaro.

Laŭ "Daily Worker" trad.
G. Saville.

Antireligia Batalo en Sovetio

La lastan tempon la antireligia agado en Sovetio eniris en novan fazon: surloke de l' antaŭaj metodoj de malprofunda, efemereca propagando venis novaj, pli raciaj kaj pli taŭgaj por la sovetaj cirkonstancoj. En la urboj la antireligia laboro estas sufiĉe facila kaj fruktodona. Dum la daŭro de du jaroj preskaŭ ĉiutage alvenas, jen de unu, jen de alia loko de l' senlima Sovetio, sciigoj pri tio, ke laboristaj aŭ kamparanaj eks-kredantoj likvidas preĝejojn, sinagogojn, moskeojn, kaj la ejojn decidas uzi por utilaj celoj; instalo de novaj lernejoj, kluboj, manĝejoj, malsanulejoj, infan-vartejoj, somerripozejoj ktp.

Estas treege interese observi kiel urbanoj el diversaj klasoj rilatas al religio: pli bone kaj ofte, ol ĉiuj aliaj, vizitas preĝejon la komercistoj, eks-bienhavantoj kaj aliaj parazitecaj elementoj de l' socio, poste venas la hejm-metiistoj, oficistoj (el la ĝisrevoluciaj funkciuloj[1]), kaj nur post ĉiuj venas la laborist-edzinoj kaj tute malgranda kvanto da maljunaj kaj malkleraj laboristoj.

Pli fruajn metodojn de iom "kriema" propaganda agado (ili estis tro "akraj" kaj povis sekvigi malbonan efikon) anstataŭis novaj, en kiuj la ĉefa loko estas disponita por *laŭgrada*, sed funda *perscienca* laborado antireligia. — Malgraŭ tio la sukcesoj de l' ateismo en urboj estas sufiĉe brilaj.

[1]) Benjamin Gitlow — fama komunista gvidanto kiu estis kondamnita al 10 jara malliberejo laŭ leĝo nomata "krimeca anarkismo".

Ni ne devas forgesi ke la popoloj kiuj loĝas sur la sovetia teritorio, longe apartenis al la plej malkulturaj gentoj de Azio kaj Eŭropo. — Centjaroj da carismo kaj da tutpopola ĝenerala malklereco lasis tian heredaĵon[1]), kiu ne povas tro favori la kontraŭreligian agadon inter la kamparanoj.

Kaj se multegaj preĝejoj estas ankaŭ likviditaj en vilaĝoj, se inter la vilaĝanaro aperas ĉiutage novaj "rondetoj de sendiuloj" kaj ofte eksiĝas konsciiĝintaj pastroj; se precipe la junularo iom post iom malaperas el la nombro de l' preĝej-vizitantoj, tio bone montras, kiom estas intensiva la laboro, farata ankaŭ ekster la urboj.

Estis necesaj specialaj antireligiaj propagandistoj, prelegistoj. Tial estis urĝe malfermitaj en multaj lokoj specialaj kursoj pri antireligia propagando. En iuj lokoj (ekzemple, Odessa) oni eĉ fondis mallong-kursajn

Antireligiajn Seminariojn

Tio estis la unua fojo, ke seminarioj edukigis ne popol-trompantajn, ne popolvenenistojn, sed ulojn, kiuj forpelu la religian nebulon kun la lumilo de l' scienco en mano.

Ĉiuj **lernejoj** (de l' unuagradaj vilaĝaj lernejetoj ĝis la grandegaj universitatoj) preparas novan **sendiecan** generacion. Eĉ tie, kie la problemoj religiaj kaj la rolo de tiu veneno estas pli malpli funde priparolitaj, tamen la instruado mem de l' sciencaj disciplinoj estas tiamaniere farata ke ĝi purigas la spiriton je la religiaj superstiĉoj.

Ankaŭ ne estas eble silenti pri la granda rolo de l' laborist-kamparana

Ruĝa armeo

en la antireligia laboro. En la trupoj de l' ruĝa armeo oni ne nur likvidas la analfabetecon de multiuj, sed ankaŭ preskaŭ ĉian religian kredon. La popular-kleriga laboro en la armeo estas sufiĉe intensiva kaj estas bone atentita la religia demando. Tial estas sufiĉe maloftaj la okazoj, kiam ruĝarmeanoj vizitas preĝejon. Ekzemple en la urbo, kie loĝas la aŭtoro de ĉi-linioj, longe troviĝis tuta divizio, sed li **ne unu fojon** rimarkis ruĝarmeanon, enaŭ elirintan el preĝejo. Ĉar la ruĝarmeo enhavas multege da vilaĝanoj (la plejparto de l' loĝantaro), ni povas aserti ke ĝi estas grava fortikaĵo en la antireligia batalo. Ja la ruĝarmeanoj "senreligiiĝas", sed krome, reveninte hejmen, ankaŭ disvastigas la "ateisman infekton" en la vilaĝoj. Estas konstatite, ke malmobilizitaj ruĝarmeanoj ludas gravegan rolon en la kamparana ateista movado.

Inter anoj de diversaj eklezioj la kontraŭreligia batalo estas kun diversa aktiveco farita:

Inter ortodoksuloj (plejparto de l' loĝantaro) estas kompreneble farata la ĉefa laboro, sed, ni ripetas, en urboj, lernejoj kaj ruĝarmeo ĝi estas pli vigla, ol en vilaĝoj. Niajn sukcesojn iom plifaciligis ankaŭ la skismo okazinta en la eklezio (apero de "viva eklezio" kvazaŭ-revoluciema); krome en Ukrainio ĝis nun daŭras plej kruelaj konfliktoj inter la "aŭtokefalistoj" (adeptoj de sendependa eklezio ortodoksa por Ukrainio) kaj iliaj kontraŭuloj.

[1]) En eŭropa parto de Sovetio estas regionoj, kie la duono de l' loĝantaro estas nelegiva (analfabeta). Sed en Azio la situacio estis ĝis nun ankoraŭ pli teruriga. Ekz. en Turkmena respubliko 97% de l' indiĝenaro estis nelegivaj.

Inter judoj — la ateismo sufiĉe prosperas. La plejparto de l' laboristaro kaj de la junularo el terkulturaj kolonioj estas senreligia. Estas komencata antireligia agado inter hejm-metiistoj. Obstinaj religianoj estas la komercistoj. — La nombro de l' likviditaj sinagogoj estas sufiĉe impona, jam okazis kelkaj eksiĝoj de rabenoj. Estas interese noti, ke la eksiĝintoj ofte fariĝas bonaj helpantoj de l' antireligia agado.

La agado **inter musulmanoj** (mahometanoj) estas precipe malfacila ĉar la tataroj, kirgizoj, turkmenoj kaj ceteraj nacietoj, apartenantaj al Islamo, estas treege malkleraj kaj, kompreneble, oni povas forloĝigi el spiritoj la dion, nur enloĝiginte tien la lumon, donacinte al la indiĝenoj legivecon. Kaj tiel estas farate. Tamen entuziasmuloj komencis inter la indiĝenoj atakon kontraŭ Alaho kaj la mulahoj — parazituloj, kiu ie alportas sufiĉe kontentigajn rezultojn.

Troviĝas en tute embria stato la antireligia agado inter la multegaj sektoj (baptistoj, menonitoj, karaimoj) kaj la katolikoj kaj luteranoj. Tio ne estas mirinda, ĉar tiuj sektoj kaj eklezioj estas en Sovetio la plej malgrandnombraj.

La peza artilerio, kiu permesis tiom sukcese bombardi la religion, rifuĝintan en siaj plej potencaj fortikaĵoj, estis

la antireligia literaturo.

La tuta sovetia gazetaro kompreneble subtenas la kontraŭreligian batalon. Do, se en la multaj centoj da ĉiutagaj kaj miloj da ceteraj periodecaj organoj aperas sennombra kvanto da artikoloj pri la tuŝata temo, ne estis necese havi tro multajn specialajn gazetojn. Kaj tial aperas nur kelkaj organoj:

Ruslingvaj:

"*Bezboĵnik*" (Sendiulo) ĉiumonata ilustr. revuo, kaj samnoma "*Bezboĵnik*", ĉiusemajna gazeto;

"*Vesjolyj Bezboĵnik*" (La Gaja Sendiulo), humor. gazeto;

"*Ateist*" ĉiumonata revuo (precipe kun riĉaj sciencaj kaj historiaj materialoj);

Ukrainlingve:

"*Bezvirnik*" (Senkredulo) — ĉiumonata ilustr.

Dum pasinta jaro estis ankaŭ komencita la eldonado de jidlingva monata ilustr. revuo "*Epikojres*" (laŭsence: *liberpensulo*).

La ateista propagando inter musulmanoj estas treege grava. Tial la centra k-to de Rusia Kom. Part. decidis proksimtempe komenci eldonadon de kontraŭreligia revuo "*Scienco kaj Religio*" (sendube en tatara lingvo). Tio estos **la unua musulmana ateista organo en la mondo!**

La pol-lingvaj gazetoj en Sovetio sufiĉe bone kontraŭbatalas la klerikalismon de l' *katolikaj* pastroj.

Por kontraŭreligia propagando estas ofte uzata la radio-disaŭdigado.

* * *

Plej riĉega estas la neperiodeca ateista literaturo. Depost la revolucio de 1917 aperis ĉ. 2000 eldonoj de originalaj aŭ tradukitaj antireligiaj kaj antiklerikalaj verkoj. La plejparto de l' multcentaj sovetiaj eldonejoj senĉese provizis la libromerkaton per abunda ateista literaturo, sed pli ol ĉiuj tion faris la gigant-eldonejoj: Ŝtat-Eldonejoj Rusia, Ukrainia, "Ruĝa Novo", "Proleto", "Voj' al klerigo", (nun "Ruĝa Vojo"), "Moskva Laboristo", "Leningrada Ŝtat-Eld." kaj cet. Multegon aperigas la gazet-eldonejo de "Bezboĵnik". Inter dekoj da aliaj eldonaĵoj estas speciale fama la "Biblio por kredantoj kaj nekredantoj" de E. Jaroslavski. De tiu verko aperis kvar partoj: "Kreo de l' mondo", "Genezo", "Levitoj", "Eliro". Dum pasko ĉi-jare aperis, en la kvanto de 30000 ekz. ĉiu, la 4-a eldono de l' unua parto, la 3-a de l' dua parto, la 2-a de l' tria parto kaj la 1-a de l' kvara parto. **Dum 1 1/2 monatoj** elĉerpiĝis proksimume la duono de ĉiuj tiuj novaj eldonaĵoj! La faktoj do parolas sufiĉe elokvente.

"Dum 2—3 monatoj estas disaĉetitaj ĉiuj presataj de ni eldonaĵoj" komunikas ankaŭ

la eldonejo "ATEIST".

Tio estas interesa entrepreno, kiu apartenas al la **Moskva Grupo de aktivaj ateistoj.** La devizo de l' grupo: "Religio estas veneno por la popolo". La celoj de l' grupo estas: la emancipo de l' homo el la spirita sklaveco per scienca propagando de l' **batalema ateismo,** antiklerikala batalo kontraŭ eklezĭuloj de ĉiuj kultoj, ĉar ili estas ĉiuj fakte malamikoj de l' laborularo. "Ateist" aperigis multegon da verkoj antireligiaj. Krom sciencaj libroj, estas notindaj ĝiaj beletristik-formaj kaj porteatraj antireligiaj verkoj. "Ateist" jam fondis unu "agit-punkton", speciale por larĝskala disvastigado da antireligia literaturo, kaj ĝi intencas krei novajn. "Ateist" estas organizaĵo revoluciema kaj marksista, sed eksterpartia. Maje 1925 aperis la N-o 1 de belega, konciza kaj riĉenhava (6—7 presfolioj!) ĉiumonata organo, ankaŭ titolita "Ateist".

* * *

El la diritaĵo estas bone videble ke la antireligia batalo en Sovetio troviĝas sur la vojo al grandaj sukcesoj. — Nur inter kamparanoj ĝi daŭros ankoraŭ longe, ĉar la emancipo el la religiaj katenoj venos nur kun la liberiĝo el la ĝenerala malklereco.

Tamen la jam atingita disfloro de l' ateista movado plikuraĝigu la alilandajn movadanojn:

Pratempaj idoloj kaj superstiĉoj malaperos.

Dneprano.

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Francio.

— K-doj *Henriko Lasserre,* ĝardenisto kaj *Robert Soudant,* instruisto, ambaŭ ĉe lab. orfejo "L' Avenir Social" en *La Villette-aux-Aulnes* par Mitry-Mory (Seine et Marne) dez. koresp. k ĉ. l. la unua: pri ekonomiaj kaj politikaj temoj — la dua: precipe kun geinstruistoj pri edukaj temoj.

Germanio.

— K-do *W. Hoyer,* Fabrikstr. 28, *Altenburg i. Th.* dez. koresp. k. interŝ. PM. certe resp.

Jugoslavio.

— K-do *Ŝtefano Ĉaklec,* Domaldova 10, *Split,* dez. koresp. kun filatelistoj k. p. m. kolektantoj ĉiul., interŝ. PM, ĉiukvante sed nur asortitajn. Resendas samkvante k. samvalore. Nur serioze.

Sovet-Unio.

— K-do *H. Frank,* 3-aja Sovetskaja, 21, kv. 25, *Leningrad,* (stratŝanĝo).

— K-do *Ŝulakov,* militservanto, Komunalnaja, 39, kv. 1, *Ijevsk,* Vot. Avt. Obl., dez. gekoresp. por siaj 9 lernantoj pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L., PK., PI., bfl. Akurate resp.

— K-do *G. Ŝilsuljman,* instruisto, Okrnar obraz. *Sluck* (Blankrusio) pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

La Protokolo de Ĝenevo

(Fino)

Se tiamaniere la koncepto pri "Atakanto" estas fiksita, ankaŭ nun vidiĝas, kiam la sankcioj devas esti efektivigataj. — Sankcioj, kion signifas tio?

Ili estas la plej akraj rimedoj de la Protokolo. Laŭorigine oni distingas du specojn: ekonomiajn kaj militistajn sankciojn. Militiste ili signifas kontraŭstarigi al "Atakanto" la fortojn terajn, marajn kaj aerajn de la nacioj-anoj de la Ligo de Nacioj.

Ekonomie ili signifas la forprenon de la ebloj partopreni je la interŝanĝado produkta, reduktigo de l' "Atakanto" je si mem per giganteca ringo de kontraŭbloko.

Rilate al la reduktado de la armilaro, la Protokolo ne priskribas ion, ĝi nur postulas baldaŭan konferencon pri tiu ĉi punkto. Dank' al la penado de la delegitaro franca akceptis la lasta Ligokonferenco tiurilate la jenan tekston (mallongigite): Alvoko je konferenco internacia porarmila por ĉiuj nacioj, prokrasto de ĝi, ĝis la Protokolo estos agnoskita per la necesa nombro da ŝtatoj; fikso de la konferenca programo, konsentante al ĉiu ŝtato nur tiun armilstaton, kiun ĝi bezonas por plenumi la devojn de Ligano; prokrasto de la validigo de la Protokolo ĝis kiam la konferenco internacia porarmila sukcese akordiĝos.

Jen la ĉeftrajtoj de la Protokolo de Ĝenevo. Memkompreneble tiu solva provo tute ne respondas al postuloj kiujn starigas vera mondpacigo. Malgraŭ ĉio la Protokolo tuŝas kuraĝe seriozan problemon.

Evidente estas ke la Ligo de Nacioj ne scipovas radike pritrakti ĝin, se ĝi kontentiĝas per surfacaj rimedoj. Necesas antaŭ ĉio ke tiu Ligo, rimarkinda faktoro de la estanteco kaj reprezentanto de la *Entente occidentale et Petite Entente* (t. e. la nacioj iam ligitaj kontraŭ Germanio kaj Aŭstrio dum la mondmilito) havu pli da atento al problemo de ekonomia interkonsentado, ĉar la kaŭzoj de la militoj estas laŭnature ekonomiaj. La Ligo ja havas sekcion porekonomian, ke ĝi do intime kunigu ĝin kun la Internacia Labor-Oficejo (Bureau international du travail) kaj larĝigu ties potencon!

Ke ĝi metu je la tagordo de la ventonta ĝeneralkunveno la problemon de la reguligado mondmastruma!

Kaj se ni aldonas, ke ĝi povus esti akceptanta en la Ligovicoj grandpotencojn kiel Germanio kaj Rusio, ĝi povos fruktige daŭrigi sian laboron por la necesa interpacigo de la mondo.

ŜAT-ano 300

Nerimarkita, sed grava afero

Fine, post multaj jaroj de malsukcesaj provoj, ekspedicioj kaj serĉadoj estas esplorita kaj trastudita granda parto de dezerto Kara-Kum (Nigraj Sabloroj) en Turkmenistano. Oni trovis la plej profitan vojon por elfosado de akvumanta kanalo el rivero Amu-Daria. Apud ĉi kanalo troviĝas egaj teritorioj el tero, kiu estas taŭga por terkulturo kaj brutedukado. Dum proksimaj jaroj akvo, fluonta tra la kanalo, donos 30000 desjatinojn[1]) da akvumita tero. Se la kanalon oni daŭrigos al Merva kaj Teĝena oazoj, tiam estos unu miliono da desjatinoj da tero.

Dum junio oni finis esplorantajn laborojn en Ĥivuja oazo, kiuj donis ankaŭ sukcesegajn rezultatojn. Treege fruktodonaj grundoj de Ĥivuja oazo ricevos akvon el 30-kilometra kanalo, kaj post du jaroj oni havos tie 70000 desjatinojn da tero. En okazo de plivastigo de laboroj kaj plibonigo de sistemoj tuta teritorio de fruktodona kaj akvumata tero en Ĥivuja oazo ekkreskos ĝis 400000 desjatinoj. Kaj tio ekdonos pacon kaj forigos la malamikecon pro akvo kiu daŭras en Ĥivuja oazo dum multaj dekjaroj. Terkultura mastrumado en ĉi-rajono[2]) tiam ricevos disvolviĝon neviditan en Sovetio.

Elĉerpita el Sciigiloj de VCJK

S. Bojev

[1]) Rusa are-mezurilo (1 d. = $109^1/_4$ a).
[2]) Distrikto.

La saĝulo deziras monon ĉar li ĝin bezonas. la malsaĝulo li ĝin amas. *M. Rozenfeld.*

— K-do *Dim. Snejko*, studento-mediko, Poŝtkesto 33, *Minsk*, dez. seriozan koresp., interŝ. PK., Pl., nacigazetojn. Ĉiam resp.
— K-do *Ĥoves Isaak*, ĵurnalisto, ul. Revolucii, 6, *Novonikolajevsk*, (Siberio) pri ĵurnalismo, socia vivo k. kom. movado.
— K-dino *Krimskaja Larisa*, ĵurnalistino, redakcio de Sirbirskij Gudok, *Novonikolajevsk* (Siberio) pri arto, moroj k. feminismo.
— K-do *Paŭlo Kirjuŝin*, l-a Dolgobrodskaja, 54, *Minsk*, dez. serioze koresp. pri div. temoj k. ĉ. l. interŝ. nacilingvajn ĵurnalojn k. esperantaĵojn.

KRONIKO

Britio.

London. Depost sia fondo antaŭ du jaroj la Londona Lab. Esp. Klubo konstante kunvenas ĉiusabate vespere ĉe 144, High Holborn, *London W. C. 1.* Ĉiusabate iu k-do faras paroladon pri iu temo, kiu rilatas al laboristoj, kaj poste sekvas diskuto inter la ĉeestantaro. Oni parolas nur en esperanto. Ofte ni havas gastojn el aliaj landoj. SAT-anoj estonte troviĝontaj en L., nepre venu al nia Klubo.

E. E. Y.

Svisio.

Basel. Fondiĝis "Laborista Esperanto-Asocio Basel" je 3. sept., kiu intencas bone varbi inter siaj membroj por SAT. — (Ni ĝoje salutas la progreson de lab. esp. movado ankaŭ en malgranda Svisio, kie ĝis nun ni ne havis bonan kampon. *Red.*)

PTT-istoj atentu!

Sovetlandaj PTT-istoj havas la gravan taskon, doni al sialandaj gazetoj div. aktualan materialon alilandan (kronikon, teknikajn, profesiajn artikolojn). Se ni sukcesos starigi tiun servon, ni havos la eblon, diversmaniere influi la PTT-istaron sovetlandan. Aperanta ĉiumonate "Interligilo de l' PTT" ankoraŭ por tiu celo ne taŭgas, ĉar ĝi estas tro "malgrasa" kaj tro malnovmateriala, preskaŭ tute ne uzebla en la loka profesia preso. Ni opinias, ke ni devas trovi kk. PTT-istojn en aliaj landoj, kiuj volas kunlabori sendante al ni aktualan materialon. En la Jarlibro de SAT ni trovis kelkajn adresojn de PTT-istoj, sed tro malmultajn ol ke ni povus esperi, ke ni pozitive sukcesus en nia celado. SAT-anoj, PTT-istoj, pripensu kaj ion decidu! Skribante al div. distriktaj org-aĵoj, ankaŭ pripensu esperantan aferon kaj propagandu!

Mi atendas rezultojn.

H. Ponjatovskij
Moskvo, Centra Telefon-Stacio.

Plivastiĝo de la movado en Blankrusio

En malgranda urbeto de la Minska distrikto *Kojdanovo* 2. sept. okazis lekcio de k-do Kirjuŝin pri "lingvo internacia kiel rimedo por internacia laborista interligo". Ĉeestis preskaŭ 200 p., kiuj estis tre interesitaj pri esp. post per-esperanta vojaĝo tra Blankrusio de angla lab. k-do A. Witham. Por-esp-an laboron ĉi tie konsentis helpi partiaj kaj profesiaj org-aĵoj. Por kursoj enskribiĝis pli ol 100 p. (Helpu al ni per leteroj kaj pk., ĉar tio estas la plej efika poresp. propagando). Adreso: Minskij okrug, *Kojdanovo*, Polskaja ŝkola, Szymanskaja.

Protesto en internacia lingvo en tutmonda skalo.

Korosteno (Ukrainio). Dum tuturba protestdemonstracio okaze de mortigo de polaj k-doj Hibner, Knjevskij kaj Rutmanskij, kiun ĉeestis 3500 p., parolis multe da laboristoj kaj kamparanoj, kiuj indigne protestis kontraŭ la fiago de pola burĝaro. K-do Rejtman, kiu parolis en *esperanto*, diris, ke pola registaro daŭrigas sian blankan teruron al la plej revoluciemaj polaj k-doj. "Ni kunvenante ĉi tie protestas ne nur en la limoj de Sovetio, ni ankaŭ alvokas al la tutmonda proletaro protesti kune kun ni, ke la ekspluatantoj ne plu ripetu similajn agojn", ktp.

M. R.

Liberpensulo

Oficiala gazeto de la Internacia Ligo de Liberpensuloj.

Specimeno havebla nur kontraŭ respondkupono ĉe:
Kurt Hubricht,
Leipzig-Neustadt, Mariannenstraße 22

Esperantistaj Naturamikoj!

En la kadro de la V. SAT-kongreso okazis la 14. de aŭgusto en la kongresejo ankaŭ kunveno de la naturamikoj, kie kamarado Klopfleisch el Düsseldorf raportis pri sia ĝisnuna agado. Ĉar li nun ne havas konstantan loĝejon, li devis abdiki kiel gvidanto de la tutmonda esperantista naturamika movado kaj proponis kiel centron Wien. Kun granda bedaŭro la kunvenintoj akceptis sian abdikon kaj proponon, kaj ni petas ĉiun grupon, kiu nun ekzistas en la kadro de la Turista Asocio La Naturamikoj anonci tion al la estro de nia sekcio, R. Cech, Wien, IX. D'Orsaygasse 7. Ni alvokas la Naturamikojn por kunlaborado kaj disvastigo de nia movado inter la turistoj kaj petas ĉiun sciigon direkti al la supra adreso.

La Wien-a sekcio aranĝas ĉiudimanĉe ekskursojn, kie ni nur esperante parolas, kaj kiuj ankaŭ estas bone vizitataj. La sekcio komencos la 23. de septembro merkrede novan kurson por komencantoj, en la popollernejo, II. Blumauergasse 25, je la 7-a vespere. Aliĝoj tie ĉe la kursgvidanto k-do Warkany.

Nekrologo

22. junio mortis unu el niaj plej fervoraj kaj esperplenaj k-doj

HARALD AANNESTAD
(SAT-ano 1065)
en aĝo de 22 jaroj. *SAT-anaro de Oslo*

El Bulgario ni ricevas sciigon pri la morto de fervora k-do

HRISTO KOLEV
fervojisto el Gabrovo, pri kiu funebras la tuta bulgara SAT-anaro.

Honoron al ilia memoro!

Novaj sukcesoj de Esperanto en Sovet-Unio

Tiu ĉi foje sian atenton al Esperanto montras jam la ŝtata organo, kaj nome — la Popola Komisario de Poŝtoj kaj Telegrafoj (Narkompoĉtel) de Unio de SSR. kiu per kelkaj siaj lastaj agoj diversflanke atentas nian lingvon.

Eble la plej grava el ili, en la skalo ankaŭ tutmonda, estas la jena: la Kolegio [1]) de la nomita Komisario rajtigis delegitaron de USSR ĉe la Tutmonda Telegrafa Kongreso, okazanta en Parizo dum septembro nunjara, proponi kaj defendi Esperanton, kiel internacian lingvon de telegrafio. Tiun proponon de Sovetia delegitaro subtenas ankaŭ Ĉinio, kies delegitaro preterveturante Moskvon interkonsentis tiurilate kun reprezentantoj de Poŝt-Telegrafa Popolkomisario de USSR.

La alia decido de Narkompoĉtel koncernas jam realan utiligon tujan de Esp-o. Nunjare, unuafoje post la milito, estas eldonataj oficialaj poŝtkartoj por internacia korespondo. Certe, ĉiuj memoras ke tiuj poŝtkartoj ordinare havas tekston en multaj lingvoj, el kiuj nepre necesa estis la franca. Kaj jen Sovet-Unio faras grandegan krimon: ĝi ne uzas sur tiuj poŝtkartoj francan lingvon, konsiderante sufiĉa uzi nur Esp-on. Kaj la poŝtkartoj (kun enpresita poŝtmarko) aperas kun esp. lingva teksto („Poŝtkarto", „Respondo afrankita" k. t. p.) anstataŭ la franclingva! Ŝajne, k-doj, Esp-o paŝas antaŭen pli rapide ol ni ĉiuj esperis, ĉu ne?

La tria fakto koncernas parte filatelion, sed iuflanke ĝi estas ankaŭ valora por ni — temas ja denove pri ŝtata mondokumento! Ĉiu klare komprenas, ke poŝtmarko estas tia mondokumento ŝtata, ĉar ĝi estas nenio pli, ol aparta maniero pagi al la ŝtato pro la poŝtservoj de ĝi farataj. Kaj jen, en septembro nunjara Narkompoĉtel eldonas je memoro de inĝeniero Popov, inventinto de radio-telegrafo, jubilean poŝtmarkon kun lia portreto kaj kun teksto esperantlingva.

Do la poŝtkartoj kaj la Popov-poŝtmarko estas la unuaj oficialaj ŝtatdokumentoj, uzantaj Esp-on. Ŝajnas, ke tiuj faktoj havos varban por Esp-o signifon ne nur en Sovetio, ĉar ĉiu laboristo esp. ista en ĉiuj landoj povos per la poŝtkarto kaj poŝtmarko atentigi sian k-don pri tio ke Esp-o jam estas aplikata de la laborista ŝtato en ĝiaj oficialaj dokumentoj, destinataj por mondskala uzado.

G. D.

[1]) En Sovetio la laboron de Popolkomisarioj gvidas ne unuopaj Komisaroj sed kolegioj, konsistantaj el Popolkomisaro kaj liaj helpantoj.

Atentu!

SAT-anoj el la teritorio de *Rejnlando* kaj *Vestfalio* vizitu la

SAT-konferencon

kiu okazos la 27. Septembro 1925 en la popoldomo de *Köln*, Severinstr., posttagmeze je la 2½a h.

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)